

Lumo

ISSN: 0827-3154

ENHAVO | SKIZO

Kanadaj novaĵoj	3
Raportoj kaj kontribuaĵoj	20
Diversaĵoj	41

LIMDATO

POR LA VENONTA NUMERO

La 15a de aprilo 2017

lumo.revuo@gmail.com

Lumo estas la revuo de
La Kanada Esperanta-Asocio.
Por membriĝi en KEA, vizitu nian retejon.

DETALE ENHAVO DE LA NUMERO

Redaktorina rubriko	1	Vojaĝo tra Eŭropo, somero (julio-aŭgusto) 2016	23
KANADAJ NOVAĴOJ	3	Kanada literatura antologio	31
Kamila Koziej Lévesque kaj Nicolas Viau diskutas pri siaj spertoj dum ARE	3	- Perdita dimensio	33
Zamenhofa festo : kio okazis en kanada Esperantujo	11	- La senfino proksimiĝas al ni	35
Invitletero al Montrealo por la UK 2020	13	- Vespero de vintro	39
Anonco pri NASK	16	DIVERSAĴOJ	41
KEA ofertas stipendiojn	17	Literatura novaĵo: Bridge of Words de Esther Schor	41
Filmeto de TFO: 'Esperanto: lingvo neŭtrala kaj justa'	18	Anonco : Internacia kalendaro pri e-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!	42
Filmo pri la vivo kaj agado de Normando Fleury	18	Anonco: Elŝutu PReVo!	42
Eduardo Vivancos : La plej maljuna membro de KEA	19	Anonco : inter Ipernity-malapero kaj Facebook, ekzistas alternativo!	43
RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ	20	Vidu informleteron de Vinilkosmo	43
Renkontiĝo esperanta dum kunveno arta kaj danca	20	Peto de Koresponda servo de Japana Esperanto-Instituto	44
Varap-zono	21	Krucvortenigmo	45
		Vorta serĉo por geknaboj: Koloroj Kontribuantoj	46 47

Redaktorina rubriko

Iufoje ŝajnas, ke nuntempo opozicias pasintecon, ke tradicioj perdiĝas kiam novaĵoj aperas. Tamen, de alia vidpunkto malpli duuma, paso de l' tempo estas procezo de evolucio, kaj tiu evolucio aperas en diversaj manieroj: aĵoj malperas, novaj anstataŭas, aliaj restas same kiam ceteraj transformiĝas kaj adaptiĝas al novaj realecoj. Ĉi-tiu nova numero de Lumo prezentas artikolojn kaj anoncojn kiuj temas pli-malpli rekte pri tio procezo. Kiam multaj agantoj partoprenas la esperantan movadon kaj aktivas por ĝia kresko kaj adaptiĝo, aliaj momente superrigardas la movadon kaj substrekas la laboron de esperantistoj ekde pluraj jaroj.

Tiel, la numero enhavas gravan anoncon pri la oficiala kandidatiĝo de Montrealo por la 2020a Universala Kongreso (UK), kaj teknologiajn anoncojn pri retaj iloj: internacia kalendaro, esperanta vortaro por poŝtelefono, kaj nova socia retejo por esperantistoj. Samtempe, legantoj povas spekti du filmetojn en la franca lingvo pri la evoluo de la esperanta movado en Otavo kaj Montrealo, kaj pri la agado de Normando Fleury. Artikoleto prezentas la viziton de Matthew Chisholm, Ken Price kaj Detlef Karthaus al la plej maljuna membro de KEA, Eduardo Vivancos. Eĉ pli, tiu superrigarda vidpunkto sur la movado rilatas al novaj esperantistoj kiel Esther Schor, kies libro *Bridge of Words* havis bonajn recenzojn en kaj ekster la movado.

Tamen, sekvante tradiciojn aŭ ne, gravas ke esperantistoj daŭre renkontiĝas: Kamila kaj Nicolas Viau rakontas siajn spertojn dum ARE, esperantistoj el diversaj kluboj rakontas pri siaj Zamenhofaj Tagoj, Geoffrey Greatex prezentas sian vojaĝon tra Eŭropo dum UK en Slovakio, kaj oni invitas legantojn partopreni NASK-n ĉi-somere (KEA ofertas stipendion!), kaj ankaŭ vidi informleteron de Vinilkosmo por subteni e-musikon. Krome, kial ne korespondi kun japanoj tra servo de la Japana Esperanto-Instituto?

Cetere, legantoj povas legi pri sperto de Lottie Ericson ĉe Varap-zono, pri la esperanta renkontiĝo de Martin Lavallée, kaj malkovri poezion el la Kanada Literatura Antologio. Finfine, amuza novaĵo: Lumoricevis proponon de krucvortenigmo por plenkreskuloj kaj de vorta serĉo por geknaboj!

Bonan legadon,
kaj bondezirojn al esperantistoj por la
Internacia tago por la rajtoj de virinoj!

Kamila
[Camille-Amélie Koziej Lévesque]
Redaktorino



KANADAJ NOVAĴOJ

KAMILA KOZIEJ LÉVESQUE KAJ NICOLAS VIAU DISKUTAS PRI SIAJ SPERTOJ DUM **ARE**

Okazis la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) en Silver Bay, kiu situas apud lago en tre bela montara regiono en la usona ŝtato de Nov-Jorkio. Inter la 8a kaj 10a de oktobro 2016, kuniĝis esperantistoj el nordorienta Ameriko en ege amika etoso.

Kamila kaj Nicolas Viau, kiuj ricevis subtenon de KEA, komentas la semajnfinojn.

Kamila: Kial vi decidis partopreni ARE-n?

Nicolas: Nu, kiel vi scias, mi aktivas de kelkaj jaroj en Esperantujo en Montrealo, kaj de 2013 ĉiam partoprenis MeKaRon sed pro diversaj kialoj, mi neniam partoprenis ARE-n antaŭe. Do mi decidis, ke 2016 estu la jaro por tio! Estis tre bona decido kaj sperto.

ARE estas malsama ol MeKaRo, ĉar dum MeKaRo oni multe marŝas kaj vojaĝas de loko al loko (ĉiam apud la «kongresa» urbo), kvankam dum ARE oni restas en la sama loko.

Kamila: Bonŝance, la kongresejo en Silver Bay estas sufiĉe granda kaj interesa.

Nicolas: Jes! Ĉu estis via unua sperto en ARE?

Kamila: Ne estis mia unua ĉeesto, sed estis mia unua partopreno kiel vera sperantisto. Mi akompanis mian patrinon foje antaŭe, sed dum

ŝi partoprenis la kongresan programon, mi kaj mia fratino mem organizis apartan programon por ni, ĉar ni ne povis partopreni la oficialan programon sen paroli la lingvon. Mia patrino tre fieras pro mia Esperantiĝo kaj ĝojas pro la fakto ke mi nun povas partopreni renkontiĝojn kun ŝi.

Ĉu vi ĝuis la diversajn programerojn?

Sabate, la 8a de oktobro

Time	Mandejo	Morse	Field
6:30-7:00	Kontinenta Matenmanĝo		
7:30-9:00	Matenmanĝo		
8:00-9:00		Bonvenon! Welcome! Bienvenue! Por kontribui al la kultura vespero, kontaktu Tomasen.	
9:00-10:00			
10:00-11:00			
11:00-12:00			
11:30-1:00	Tagmanĝo		
1:00-2:00			
2:00-3:00			
3:00-4:00		Bonvenon kaj Plia Jaco en Esperanto	
4:00-5:00		Literatura Horo (Normando Fleury)	
5:30-7:00	Vespermanĝo		
7:00-8:00		Amika Vespere (Normando Fleury)	
8:00-9:00			

Dimanĉe, la 9a de oktobro

Time	Mandejo	Morse	Field
6:30-7:00	Kontinenta Matenmanĝo		
7:30-9:00	Matenmanĝo		
8:00-9:00			
9:00-10:00		Kanto de la Koloroj (Ron Glossop)	Poeto pri te-folioj (Orlando Raella)
10:00-11:00		Paroliga Rondo por Novuloj (Tomaso Alexander)	La Signifito de Nuna Homara Epoko (Ron Glossop)
11:00-12:00		Irlanda Dancado (Diana Alexander)	Ginko Promeno (Steven Brewster)
11:30-1:00	Tagmanĝo		
1:30-2:30		Mia Nova Vivo kiel Junatino (Tomaso Alexander/Jake H)	
2:30-3:00		Libera Tempo	
3:00-4:00			
4:00-5:00			
5:30-7:00	Vespermanĝo		
7:00-8:00		Kultura Vespere	
8:00-9:00			

Nicolas: Jes! Mi iom malfruis la unuan tagon, do maltrafis la malfermon, sed partoprenis programerojn post tio. Mi bone amuziĝis dum la amika verspero sabate. Dimanĉe - la plej aktivajplena tago - mi ĉeestis prelegon pri la «Signifo de la Nuna Homara Epoko». Ron Glossop, la preleganto, eksplikis vizion pri mondo unuigita pere de internaciismo, federaciismo kaj kompreneble komuna lingvo... Esperanto! Indas diri, ke lia vizio, lia espero, ŝajnas iom for nuntempe... Sed Esperantistoj ĉiam esperas, ĉu ne?

Mi ankaŭ partoprenis la «Ginkan Promenon» de Steven Brewer pri hajko-verkado en Esperanto. Tio estas afero, kiun mi neniam faris antaŭe! Ni do promenis sur la bieno, verkante pri tio, kiun ni vidis: folioj, ŝtonoj, ajnaj aferoj.

Ĉar mi estas parolema kaj marŝema homo, poste mi elektis marŝi en la arbaro kun grupo por supreniri kaj vidi la lagon desupre. Estis ankaŭ bona okazo konatiĝi kun homoj, kiujn mi ĝis tiam ne renkontis.

Ĝenerale, fakte, mi renkontis multajn novajn homojn. Tio kompreneblas, ĉar certe estas homoj kiuj kutimas partopreni ĉefe ARE-n kaj ne MeKaRon.

La kultura vespero estis ankaŭ interesa. Mi aparte ŝatis la pianludadon de John. Mirinde!
Kiuj estis viaj plej ŝatataj programeroj?



Kultura vespero

Kamila: Mi partoprenis sabate amikecan vesperon, kaj dimanĉe mi partoprenis aktivaĵon pri irlanda dancado kaj ankaŭ tiu pri Jutubistoj (mi maltrafis parton de ĝi). Rigardante miajn fotojn, mi memoras nun, ke mi pafarkis multe dum mia libera tempo.



Alexander Thomas kaj lia filmeto: La barboj de Esperantujo



Pafarkado



Alia memorinda afero estis la grupfotado! Estis tiom malfacile venigi ĉiujn homojn samtempe por grupfotiĝi! Mi opinias, ke oni devus venontjare inkluzivi tion en la programo tiel, ke homoj jam sciu, ke ili devas je difinita horo aperi por fotiĝi.



Grupfotado

Tamen mi ne povis partopreni ĉiujn prelegojn, bedaŭrinde! Dum tiu semajnfino, mi devis finprovlegi la tiaman numeron de Lumo, do mi multe laboris pri tio... almenaŭ estis en Esperanto! Mi pli multe partoprenis en la kultura vespero, en kiu mi kantis, ol en prelegoj kaj aktivaĵoj. Dum kultura vespero mi rimarkis, ke multaj esperantistoj havas belegajn talentojn!

Dum kultura vespero mi rimarkis, ke multaj esperantistoj havas belegajn talentojn! Mi devas malkaŝi, ke surloke de Silver Bay estas belega malnova teatro, kaj ĝi estas disponebla petante ĉe la akceptejoj. Eta grupeto iris tien kaj daŭris kulturen vesperon; ni kantis, dancis kaj muzikon ludis en pluraj lingvoj. Kial ne organizi tien venontan kulturen vesperon?



Daŭro de la Kultura vespero en malnova teatro



Amika etoso en loĝejo «Hillcrest»

Vere menciindas ankaŭ la etoso en la junulara loĝejo "Hillcrest"... oni multe diskutis kaj tabulludis dum la nokto. Tio estas neforgesebla parto de la sperto tie.

Multaj Usonanoj ankaŭ spektis la prezident-balotad-debaton. Nur restis kelkaj semajnoj antaŭ gravegaj politikaj elektoj tiam! Ne mankis temoj por kune diskuti!

Kaj kio pri la lasta tago?

Nicolas: Mi devas diri, ke sufiĉe gravaj decidoj okazis dum ARE pri la ebla venonta UK en Montrealo en 2020. Kiam ni alvenis, estis kelkaj duboj pri la organizado kaj la farebleco de ĉio, sed post multaj diskutoj (kaj ankaŭ la entuziasmo de Orlando Raola), organiza teamo formiĝis, kaj la optimismo revenis - ĝi iom malfortiĝis post la malgajno en 2015 pri la UK en 2017.

Aferoj pli konkrete formaliĝis lundon dum la diskutrondo organiza pri la temo. Vere kuraĝigas nin scii ke tiom da Esperantistoj, ne nur en Kanado sed ankaŭ en Usono, apogas la projekton kaj pretas helpi nin! Ni nun forte fidis pri la fakto, ke la Montreala UK okazos en 2020!

Ankaŭ estis rondo pri venontaj ARE. Homoj ĉiam havas ideojn pri plibonigo, ktp. Mi mem ne povas kompari kun aliaj jaroj, sed laŭ mi la evento estis bone organizita.



Dum tiu lasta tago, oni ankaŭ parolis dum prelegeto pri la tiel nomataj "virtualaj" Esperantistoj. Estas aparte multe da ili nun kun, ekzemple la populareco de la Duolingo-kurso ĉe la reto. Miloj kaj miloj aliĝas, kelkaj verŝajne atingas bonan lingvonivelon, sed tamen ĝis nun oni vidas relative malmulte da ili en la tradicia

"ĉeesta" movado. Gravas do provi kompreni, ĉu iliaj motivoj malsamas ol tiuj de homoj, kiuj antaŭe lernis la lingvon, aŭ ol tiuj, kiuj lernis ĉefe por renkonti homojn, kaj ne nur kiel lingva kuriozaĵo (tamen oni certe rajtas ankaŭ tion fari, se oni emas).

Kamila: Jes, tamen venis tutnovaj Esperantistoj al ARE. Mi aparte pensas pri Sophie, kiu konis neniun, kiam ŝi alvenis! Oni bezonas kuraĝon por fari tion, kaj mi vere esperas, ke ŝi ĝuis sian unuan Esperanto-renkontiĝon, kaj ke ŝi daŭre parolos la lingvon estontece!

Mi esperas ke mi retrovos samajn amikojn venontjare, kaj ke ARE daŭre allogos esperantistojn al tiu belega kaj afabla loko!



ZAMENHOFA FESTO

KIO OKAZIS EN KANADA ESPERANTUJO

Ĉiun 15an de decembro (aŭ proksime), geesperantistoj tra la mondo kunvenas kaj celebras la naskiĝtagon de Zamenhof, kiu naskiĝis en 1859. Alternative, tiu tago ankaŭ estas konata kiel Tago de la Esperanto-literaturo (Esperanto-Librotago), kaj eĉ kiel Tago de Esperanto-kulturo. Okaze de tiuj eventoj, kluboj el diversaj urboj tra Kanado organizis specialajn renkontiĝojn dum la semajno kaj amuziĝis lastfoje antaŭ ferioj de Kristnasko kaj nova jaro. Tri esperantistoj kiuj partoprenis lokajn eventojn rakontas pri tio, kion ili faris.

La 11-an de decembro 2016, kalgariaj esperantistoj, inter ili 7 membroj de Kanada Esperanto-Asocio, partoprenis festenon ĉe la domo de Allan kaj Meredith Simon okaze de naskiĝ-datreveno de Zamenhof, la Tago de Esperanta Kulturo kaj la Internacia Tago de la Esperanto-Libro. Ni babilis kaj kantis Esperante, ni manĝetis kaj trinkis, kaj ni vizitis Libraron Ludovikan, la bibliotekon de Kanada Esperanto-Asocio.



Paul Hopkins, Kalgario

Okaze de la Zamenhof-festo, ni kune manĝis en la restoracio Vittoria Trattoria en la Otava kvartalo By (ByWard Market / Marché By). Partoprenis sep Esperantistoj. La manĝoj kaj konversacioj estis tre bonaj. (La servistino tre scivolis pri kiu lingvo ni parolis kaj eĉ deziris al ni 'Bonan apetiton' (post kiam ni informis ŝin kiel tion diri.) Entute, tre agrabla vespero!

Dankon pro via mesaĝo, Kamila, kaj gratulojn pro via bona redaktado de Lumo!

Bruce Crisp, Otavo

Mia unua Zamenhofa festo

Mi ankoraŭ lernas Esperanton, kaj mi ne pensis, ke mi estis preta por granda evento en la Esperanto-komunumo. Mi tre ĝojis, kiam oni demandis min, ĉu mi volas ĉeesti la Zamenhofan feston de Esperanto-Toronto. Mi multe amuziĝis, kaj lernis kiom mi fakte scipovas nian lingvon.

Estis multo por manĝi kaj trinki, kio ĉiam kunigas homojn. Ĉiu babilis kaj amuziĝis. Ni aŭskultis Esperantan muzikon tra la tuta festo. Pli malfrue en la vespero ni kantis karaokeon en Esperanto, kio estis amuzega. Ni ankaŭ ludis ludojn en Esperanto, kio vere provis miajn lertecojn. Ni ludis Esperantigon de la ludo Taboo (tabuo), kiu estas lingva ludo. Mi lernis, ke mia komprenado fakte estas tre bona, sed mi ankoraŭ ne tre bone parolas.

Estis vere amuze pasigi tempon kun Esperantistoj en domo de samideanoj, kiu estas pli intima ejo ol en kafejo. Mi pensas, ke ankaŭ estis bona sperto por mi iri preter kion mi supozis, ke mi povus fari, ĉar tio helpis min konstati, je kiu nivelo miaj lertecoj fakte estas.

Kiara Waters, Toronto

Invitletero al Montrealo por la UK 2020

Jen grandega novaĵo: Montrealo kandidatiĝas denove por organizi UK-on!
Legu la oficialan invitleteron de KEA al la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Kanada Esperanto-Asocio
La 2-an de januaro, 2017

Veronika Poór
Ĝenerala Direktoro de UEA

Estimata S-ino Poór:

Nome de la estraro kaj membraro de Kanada Esperanto-Asocio (KEA), mi kun granda ĝojo invitas la 105-an Universalan Kongreson de Esperanto al Montrealo en 2020.

Montrealo estas centro de vigla Esperanta vivo kaj agado, ne nur en Kanado, sed en la tuta Nord-Amerika kontinento. Okazigo de Universala Kongreso en Montrealo estus ne nur grandega honoro por ni, sed ankaŭ grava impulso por la Esperanto-Movado en Nord-Ameriko, kontinento mankanta en la listo de UK-oj jam de pli ol 30 jaroj.

Laŭ movada vidpunkto, Montrealo estas ideala kongresurbo pro la longa historio de agado kaj event-organizado en la urbo kaj en ĉirkaŭaj regionoj. Montrealo jam gastigis UK-antaŭkongreson (1984), IJK-on (1992), Nord-Amerikan Kongreson (1998) kaj Tut-Amerikan

Kongreson (2008), kaj ĉiujare Esperanto-Societo Kebekia (bazita en Montrealo) aranĝas la Mez-Kanadan Renkontiĝon (ekde 2003) kaj, kunlabore kun esperantistoj en nord-orienta Usono, Aŭtunan Renkontiĝon (ekde 1993). La loka movado, aktive subtenata de esperantistoj en la cetero de Kanado kaj en Usono, do havas solidan sperton pri organizado de Esperantaj eventoj por povi entrepreni la taskon organizi UK-on.

Laŭ kultura kaj socia vidpunktoj, Montrealo estas ankaŭ tre konvena loko por UK. Montrealo estas rara urbo en Norda Ameriko (fakte eĉ en la mondo) pro sia unika lingva situacio. La plej granda franclingva urbo en Kanado (dua en la mondo post Parizo), kaj ankaŭ la plej granda anglalingva komunumo en Kebekio, kun multaj aliaj lingvokomunumoj, Montrealo estas urbo kie la lingva demando estas ĉiam kaj ĉie sentata. La lingva diverseco de Montrealo estas do perfekta fono por la plej grava elmontriĝo de la Internacia Lingvo.

Tre historia urbo, Montrealo ankaŭ allogas per la turismaj ebloj kiujn ĝi proponas al kongresanoj. Vizitantoj ĝuas ne nur tradiciajn vidindaĵojn (preĝejojn, muzeojn, historian kvartalon), sed povas ankaŭ profiti de la abunda kultura diverseco de la urbo, vizitante la diversajn etnajn kvartalojn de Montrealo.

Konsiderindas, tamen, ne nur la specifaj allogaĵoj de Montrealo, sed ankaŭ la avantaĝoj de ĝia situo en Nord-Ameriko. Lastfoje okazis UK en Nord-Ameriko antaŭ 32 jaroj – kaj lastfoje en la orienta flanko de la vasta kontinento (la plej dense loĝata regiono de la kontinento) en 1910! La mondo multe ŝanĝiĝis dum la lastaj 32 jaroj, kaj nia movado ne estas escepto. Ekde la lasta UK en nia kontinento aperis lernu.net, kiu kreis tute novan demografion de esperantistoj ekster la tradicia movado.

La lando kun la plej granda kvanto de registritaj uzantoj de Lernu estas Usono – kaj la kvanto de registritaj uzantoj en Usono plus Kanado estas Usono – kaj la kvanto de registritaj uzantoj en Usono plus Kanado estas jam pli ol 30000! UK en Montrealo estus bonega okazo atingi ĉi tiujn retajn esperantistojn kaj engaĝi ilin en la « fizikan » Esperanto-komunumon.

Resume, Montrealo estas tre alloga urbo por UK laŭ kultura, turisma kaj movada vidpunktoj. Krome, la situo de Montrealo en orienta Nord-Ameriko signifas ke kaj Nord-Amerikanoj kaj Eŭropanoj povas facile atingi ĝin.

Kiel landa asocio de UEA en Kanado, KEA oficiale invitas la kongreson – sed ni ne estos solaj en tiu ĉi entrepreno : ni ĝuos la aktivan subtenon de Esperanto-Societo Kebekia surloke kaj kunlaboron de nia najbara landa asocio Esperanto-USA. Niaj fortoj kuniĝos por prepari neforgeseble belan sperton por la kongresanoj.

Kun samideanaj bondeziroj,
Paul Hopkins
Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio



Anonco pri NASK

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) 2017 revenos la kvaran fojon al Universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. Du elstaraj eksterlandaj instruistoj akceptis la inviton partopreni: Katalin Kováts (Netherlando/Hungario) instruos en la Supera Nivelo, kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge (Nederlando/Francio) instruos en la Meza Nivelo. Ili ambaŭ instruis kiam la kursaro okazis en Brattleboro, Vermonto ĉe la Altlernejo de Internacia Trejnado (School of International Training) en 2006. Lee Miller (Usono) instruos en la Post-Baza nivelo.

Tuj antaŭ NASK okazos la Landa Kongreso de Esperanto-USA samloke, tiel ke oni povos veni por la kongreso kaj resti por NASK. La kongreso okazos de la 30a de junio ĝis la 3a de julio 2017. Studantoj por NASK alvenos la 4an de julio kaj foriros la 13an; lecionoj okazos de la 5a ĝis la 12a. Vespere de la alventago, studantoj povos spekti la piroteknikaĵojn okaze de la nacia festotago en la urbocentro. (La Universitato William Peace estas je promendistanco, kaj la artfajraĵoj estas videblaj de la universitatejo).

Dum la 8 tagoj de instruado, lecionoj okazos matene, kaj estos ankaŭ diversaj aliaj aktivaj kaj programoj posttagmeze kaj vespere: prezentadoj, esplorado de la belaj muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. Ĝis la 1a de marto, la baza kosto por 8-taga NASK estas \$790 (loĝado, manĝado, kaj instruado). Estas aliaj eblecoj por lokanoj kiuj ne loĝos ĉe la universitato. Petu la registrilon ĉe eddyellen@aol.com aŭ vizitu [retejon](#).



KEA ofertas stipendiojn

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas ĝis po du stipendiojn de ĝis 1000 CAD por ebligi partoprenon en la ĉijara **Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)**. Ĉiu petanto,

(a) estu Kanada rezidanto;
(b) estu membro de KEA. Ni bonvenigas petojn de novaj membroj de KEA, kaj oni eĉ povas aliĝi kaj tuj poste peti stipendion; kaj
(c) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al mateo416@gmail.com, ĝis la **15a de Aprilo 2017**. Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, klarigu siajn financajn bezonojn, kaj skribu sian mesaĝon en Esperanto. Ne timu, se via Esperanto ne estas perfekta; vi havas pli bonan ŝancon ricevi stipendion, se via mesaĝo estas skribita en Esperanto kun eraroj, ol se ĝi estas skribita en alia lingvo.

Ni kutime ricevas malmultajn petojn por stipendioj, do ĉiu peto ja konsideriĝos. Decidos pri la aljuĝo de stipendioj la eduka komisiono de KEA.

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas unu stipendion de ĝis 300 CAD al junulo por ebligi partoprenon en la ĉijara **Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo)**. Ĉiu petanto,

(a) estu naskiĝinta je la 1a de Januaro 1987 aŭ poste;
(b) estu Kanada rezidanto;
(c) estu membro de KEA. Ni bonvenigas petojn de novaj membroj de KEA, kaj oni eĉ povas aliĝi kaj tuj poste peti stipendion; kaj
(ĉ) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al mateo416@gmail.com, ĝis la **20a de Aprilo 2017**. Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, klarigu siajn financajn bezonojn, kaj skribu sian mesaĝon en Esperanto. Ne timu, se via Esperanto ne estas perfekta; vi havas pli bonan ŝancon ricevi stipendion, se via mesaĝo estas skribita en Esperanto kun eraroj, ol se ĝi estas skribita en alia lingvo.

Ni kutime ricevas malmultajn petojn por stipendioj, do ĉiu peto ja konsideriĝos. Decidos pri la aljuĝo de stipendioj la eduka komisiono de KEA.

Poste ĉijare ni ankaŭ disponigos la saman stipendion por ĉiu el la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK) kaj la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE).

Filmeto de TFO

'Esperanto: lingvo neŭtrala kaj justa'

TFO (Télévision française de l'Ontario) estas kultura kaj socia reta revuo por francparolantaj komunumoj en Ontario kaj aliloke. Oni povas spekti sur retejo de TFO [filmeton](#) en la franca lingvo, kiu ĝenerale prezentas Esperanton. Geoffrey Greatex, Yves Bellefeuille kaj Suzanne Caron Richer, la agantaj esperantistoj el Otavo, bonege klarigas la kaŭzojn, la gramatikajn bazojn kaj la funkcion de la Esperanto-movado por kiu ajn, kiu ankoraŭ ne konas la internacian lingvon. Dividu ĝin kun homoj kiuj interesiĝus pri tio!

Filmo pri la vivo kaj agado de Normando Fleury

Farita de Julien Moulin, filmo en la franca lingvo [Un homme qui espère encore](#) (Viro kiu ankoraŭ esperas) prezentas Normandon Fleury, kiu estas aktiva partoprenanto de la kanada movado. Kunteksto taŭgas por tiu atesto: Normando transprenis rolojn de ĉefdelegito kaj peranto de UEA en Kanado (Olga du Temple plenumis tiujn rolojn dum pli ol 20 jaroj); li elektiĝis Honora Membro de KEA; li prezidas Esperanto-Societon Kebekian, kiun li fondis en 1982; kaj li estras lokan komitaton por la kandidatiĝo de Montrealo por UK 2020.

La filmo enhavas plurajn etajn partojn en kiuj Normando prezentas ĝeneralan ideon de Esperanto, esperantan literaturon, esperantan movadon en Kanado, sian personan esperantan historion, la Montrealo-klubon, MeKaRon, kaj aliajn aĵojn pri la kresko de Esperanto.

Eduardo Vivancos : La plej maljuna membro de KEA

Fine de oktobro, Ken Price (maldekstre), Detlef Karthaus (fotinto) kaj Matthew Chisholm (dekstre) visitis Eduardon Vivancos (meze), la plej maljuna membro de KEA. Li naskiĝis en Barcelono en 1920 kaj nuntempe li estas en flega loĝejo pro malfacilaĵoj kun ekvilibro kaj perdo de vidkapablo. Malgraŭ tio, li restas akiva kaj ankaŭ ege interesiĝas pri Esperanto kaj pri la stato de la mondo.

Eduardo Vivancos nepre havas tre specialan vivsperton! Li esperantiĝis en 1936 kaj multe partoprenis esperantaj kaj anarkiistajn movadojn en Hispanio. Li eĉ defendis Katalunion kontraŭ faŝista armeo dum la hispana civila milito. Edke sia enmigro en Kanadon, li aktive partoprenis en

esperantaj aranĝoj kaj organizis aktivajn kiuj denuncis la frankisman reĝimon en Hispanio.

Oni ofte parolas pri junuloj kaj pri la kresko de Esperanto-movado ene de kunteksto de plimulto da komunikemuloj, sed gravas substreki la maljunulojn, kiuj konstruis la esperantan movadon. Pro tio, Mateo Chisholm vizitis Eduardon plurajn fojojn por intervjui lin. Poste, ĉijare, oni bonŝance povos spekti filmeton kaj intervjuon!



RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

Renkontiĝo esperanta dum kunveno arta kaj danca

Mi parolis la zamenhofan lingvon kun komencanta esperanto-parolantino Emerance Gascon-Afriat dum arta kaj danca kunveno fine de decembro 2016. Mi diris al ŝi ke mi lernis Esperanton per poŝta koresponda kurso en 1987 kaj ke traduki tekstojn en Esperanton multe helpis paroli la lingvon. Spertaj esperantistoj kiel Normand Fleury kaj Sylvain Auclair certe plezure korektos ŝiajn originalajn kaj tradukitajn tekstojn esperantajn. Diskutante internaciajn lingvojn, mi esprimis mian opinion ke Esperanto pli kaj pli latiniĝas: lipo kaj labiala, aĉeti kaj redempto montras la neeviteblon de la greklatina internacia vortprovizo. Ni sendube refaros aliajn internacilingvajn kunvenojn en neesperantaj kunteksto.

Amike salutas vin
Martin Lavallée



Varap-zono

Lottie Ericson

Unufojon jare necesas fari ion ajn kiu timigas min. Pasintan aŭtunon, mi decidis malsupreniri per ŝnuro de granda konstruaĵo en Vankuvero. La evento okazis ĉe 999 Okcidenta Hastings Strato, kie estas oficeja konstruaĵo.

Sesdek homoj registris sin por la varapado, kaj nun vi verŝajne demandas pri tio, kial ĉi tiu amaso da personoj viciĝis por riski la vivon pendi jungilare dudek etaĝojn. Estis la jara kampanjo por finance subteni BC EASTER SEALS, konata karitato kiu sendas geinfanajn handikapulojn al kamparaj lokoj apud lagoj aŭ oceano por ludi, sporti kaj naĝi.



En la pinto de la konstruaĵo. Ni estas nur du tre malgrandaj punktoj!!!

Mi kun mia amikino venis al la eventoloko frumatene je la 13a de septembro pasintjare vestitaj en nigraj trikotaĵoj, brilrozaj vestoj kaj gajaj maskoj. Estis tre amuze prepari pri ĉi tiu speciala tago kaj estis vere tre ekscitante svingi supren manipulante ŝnurojn kaj levilojn. Rigardi suben mi ne povis; tio kaŭzis al mi vertiĝon. Bonŝance la fenestrovitroj estis malhelaj kaj agis

kiel spegulo, do mi admiris belegajn vidaĵojn de montetoj, de parkoj kaj belegaj domoj trans la golfo.

La evento estis granda sukceso kaj donis \$169,000 por la peninda kaŭzo. Kaj vere mi havis eksterordinaran sperton kiu donis al mi mirindan rememoron!



Mi kan mia amikino apud la Easter Seal signo



La altega konstruaĵo kun mi kaj mia amikino

Vojaĝo tra Eŭropo, somero (julio-aŭgusto) 2016

Geoffrey Greatex

Kiel universitata profesoro mi bonŝancas povi esti relative longan tempon for de Kanado kiam mi ne instruas. Tion mi profitis dum la pasinta somero por partopreni du kongresojn: temas unue pri la 101a UK en Nitro, Slovakio, kaj due pri la 23a internacia kongreso pri bizancaj studoj en Beogrado, Serbio.

Mi vojaĝis entute dum ses semajnoj; komence mi per fervojoj veturis, poste per busoj. Mia unua haltejo estis Parizo, ĉar facilas atingi ĝin de Kembriĝo kiam oni uzas la Eurostar trajnon. Jam vizitinte multfoje la parizan ĉefurbon, mi tamen kaptis la okazon viziti la muzeon Cluny, kie troveblas multaj interesaj mezepokaĵoj kaj ankaŭ iuj romiaĵoj kaj bizancaĵoj.



imperiestro Juliano
(361-363 p.K.)



Du bizancaj diptikoj
(dekstre, Otto kaj lia bizanca edzino, Teofano, 982/3)



Forlasinte Francion, mi hastis al Freiburg im Breisgau, bela universitata urbo, kie mi ĉeestis piano-koncerton prezentitan de la direktoro de internacia muzikfestivalo, Jura Margulis. La sekva haltejo troviĝis en Munkeno, ĉarma urbo, kie mi jam pasigis ioman tempon kiel stipendiato de germana fondaĵo por fari esplorojn.



Tie mi renkontis samideaninon, Betti Maul, sed rapide daŭrigis mian vojaĝon al Vieno. Ĉi tiun urbon mi lastfoje vizitis kiam tie okazis la UK en 1992. Intertempe sufiĉe multo ŝanĝiĝis, inter aliaj aferoj la Esperanto-muzeo. Nun ĝi pli malgrandas, sed pli buntas kaj troviĝas en centra loko. Plaĉis al mi la belaj afiŝoj de antaŭaj kongresoj.



Mi nun proksimiĝis al la UK. En la flughaveno viena mi renkontis finnajn samideanojn kaj kune ni (finfine) trovis buseton, kiu nin veturigis al Nitro por la kongreso. Jam oni sufiĉe raportis pri la kongreso, kiun mi tre ĝuis ĝuste pro ĝia relative intima etoso. Mi devis forlasi ĝin jam en la vendredo, tamen, ĉar necesis atingi Veronon la sekvan tagon. Mia vojaĝo preskaŭ fiaskis je la unua paŝo, ĉar oni anoncis en la stacidomo, ke oni nuligis ĉiujn trajnojn al Bratislavo. Bonkora urbano tamen interpretis ĉion por mi kaj certigis, ke mi sukcese trafis anstataŭan buson, kiu permesis al la pasaĝeroj

atingi alian stacidomon, de kie mi finfine vojaĝis al Bratislavo, kaj poste, tra Vieno, al Linz. Tie mi havis tempon nur por tranokti, ĉar en la sekva tago mi devis denove enrajniĝi por finfine alveni unue al Innsbruck, poste al Verono. Ankaŭ ĉi tiun urbon mi plurfoje vizitis antaŭe, ĉar tie loĝas amiko el mia lernejo. Estis, kiel kutime, granda plezuro revidi lin kaj lian edzinon. Mi havis eĉ tempon por ĉeesti operon en la areno de Verono kaj por fari kelkhoran trajnekskurseton al Vicenza, kie eblas supreniri la bazilikon de Palladio, vere rimarkindan konstruaĵon.




Kongresa poŝtkarto




Ĉefa placo de Linz



urba panoramo de Verono



Baziliko de Palladio



Mi povis ankaŭ admiri surprize kleran grafiton, citaĵon de la juristo Ulpiano (ĉ. 170-223 p.K.), 'Honeste vivi (rimarku, ke iu alia klerulo korektis la sloganon!), ne lezi alian (homon), kaj atribui al ĉiu tion, kio al li apartenas'.

Tiuj principoj, laŭ Ulpiano, konsistigas la postulojn de la juro.

Mia lasta trajnvojaĝo kondukis min de Verono al Triesto. Ekde tiu momento necesis min turni al aŭtobusoj, ĉar fervojlinioj mankas laŭ la dalmatia marbordo. Mi laŭiris ĉi tiun marbordon de Triesto ĝis Dubrovnik; mi komencis la vojaĝon pli-malpli je la komenco de aŭgusto, do evidente ĉiuj lokoj estis plenŝtopitaj per turistoj. Feliĉe mi sukcesis antaŭe mendi ĉambrojn, kaj en pluraj urboj tio nur eblis pro la afabla helpo de Zdravka Metz, kiu peris kontaktojn kun amikoj kaj familianoj siaj en la lando. En Poreĉ

mi povis admiri preĝejon konstruitan dum la regno de la imperiestro Justiniano (527-565); ĝuste tiun periodon traktas multaj esploroj miaj. De tie mi veturis al Pula, impona romia urbo, kie konserviĝas admirinda amfiteatro. La sekva urbo, kiun mi vizitis, estis Rijeka, la antaŭa Fiume, kiam ĝin regis italoj. Tie mi preskaŭ renkontis samideanojn kaj malkovris imponan atestilon pri Esperanto-agado tie.



Esperanta epigrafo en Rijeka

En Zadar mi renkontiĝis kun brita amiko, fakulo pri bizanca arĥitekturo, kaj kune ni esploris la sekvajn tri urbojn. Zadar rajtas fieri pri impona arĥeologia muzeo kaj bela preĝejo de la 9a jarcento, konstruita sur la antaŭa forumo. Split estas urbo, kiun konas pluraj homoj, ĉar tie daŭre videblas la urbeto kaj palaco, kiujn la imperiestro Diokleciano (284-305) konstruigis por si. Lian maŭzoleon la kristanoj ironie konvertis en preĝejon: Diokleciano estas konata pro severaj persekutoj de kristanoj dum sia regno. Imponis nin tie muzeo plenplena je epigrafoj, same ankaŭ la apuda romia urbo Salonae (moderna Solin).



Esper Sankta Donato desupre;
kaj la forumo anta epigrafo en Rijeka



La maŭzoleo de Diokleciano,
kiu fariĝis katedralo poste

Finfine ni atingis Dubrovnik, kiun preskaŭ ĉiu konas, unuflanke pro ĝia bildkarteca beleco, aliflanke pro la sieĝo de la urbo de 1991 (kiun oni reliefigas iom ĉie en la urbo). Nun, tamen, mi rimarkis ke la plimulto da turistoj tie interesiĝas ne pri la historio de la urbo, sed male pri scenoj filmitaj por la nekompreneble populara serio 'Ludo de tronoj'.



Katedralo, preĝejo de sankta Blazio Fone, dekstre, preĝejo de sankta Ignacio



Fortikaĵo de sankta Johano; insulo Lokrum

Tie forlasis min mia brita amiko, sed renkontis min serba samideano, Simo Milojevic, bone konata en Esperantujo ĉar li laboris en RoterdamojelasidejodeUEAlongtempe, finfine kiel ĝenerala direktoro. Nun, kiel emeritulo, li loĝas nur 30km for de Dubrovnik en trankvila urbo, Trebinje, en la serba parto de Bosnio kaj Hercegovino. Li afable gastigis min dum tuta semajno kaj montris al mi plurajn vidindaĵojn en la regiono. Por atingi lian urbeton ni elektis tre malrektan vojon, trairante Montenegron; tie ni spektis la imponan golfon de Kotor kaj vizitis ĉi tiun historian urbon, kiu posedas rimarkindajn ĉirkaŭmurojn. Dum alia tago ni iris al Mostar por admiri la faman ponton, kiun

oni rekonstruis post la lastatempa milito (kaj de kiu saltadis entreprenemaj junuloj).

Mia lasta haltejo troviĝis en Beogrado, kie mi pasigis semajnon ĉe la bizanca fakkongreso. Mankis al mi tempo por rondiri vidindaĵojn, sed dum unu libera tago mi kaptis la okazon viziti la urbajn murojn. Plurflanke similas al UK bizanca kongreso: alparolas la kongresanojn moŝtuloj, ĉi-foje eĉ la prezidanto mem (dufoje!), akceptoj okazis kaj en la prezidenta palaco kaj en la urbodomo. Regas bela etoso, sed ĉiam ŝvebas la lingva demando – kiun uzi? Kaj oni konstatas, ke la angla, kiel tro ofte, pli regas ol ĝi devus.



Simo kaj mi (antaŭ la kotora golfo)



La fama ponto (rekonstruita) en Mostar

Kanada Literatura Antologio

La Viktoria Esperanto-klubo havas projekton kompili Kanadan literaturan antologion. Ni proponas, ke oni tradukos kvaronon de la tekstoj el la franca, kaj la cetero el la angla aŭ aliaj lingvoj. Indiĝenaj historioj ankaŭ gravas. Ĉiuj tekstoj devas esti verkitaj de kanadaj verkistoj aŭ okazi en Kanado.

Ni skribos al la tenantoj de kopirajto por obteni permesojn traduki iliajn verkojn. Ni esperas, ke estos malfacila procezo sed ne malebla; post ĉio, ni esperantigos nur mallongajn partojn de pli grandaj libroj, kaj ni diskonigos la verkistojn al esperantistaj legantoj, kiuj neniam legis la rakontojn kaj poemojn en la franca kaj la angla originaloj.

Mi esperantigis kelkajn poemojn kaj duonon de unu eseo, kaj mi esperas ke aliaj esperantistoj povas legi kaj kritiki la tradukojn. Se vi trovis erarojn, mi petas, ke vi sendu ilin al mi. Mi ankaŭ serĉas kunlaborantojn, provlegantojn kaj kontrolantojn. Dankon por via atento kaj helpo.

Jen kelkaj verketoj, kiujn mi esperantigis.

Eriko Pedersen

antologio@shaw.ca

2039 Gourman Place, Victoria, B.C., Canada V9B 6A9

[Blogo de la Kanada Antologio](#)

Frederick Cogswell (1917–2004)

Poeto, profesoro, redaktoro, eldonisto kaj literatura kritikisto, naskiĝis en Nov-Brunsviko. Post la dua mondmilito en Skotlando, Fred gajnis magistron kaj doktoran diplomojn, kaj ekde 1952 ĝis 1983 deĵoris kiel profesoro pri la angla lingvo ĉe la Universitato de Nov-Brunsviko. Li estis por tempo la provinca sekretario de la socialdemokrata partio, la CCF, kaj profunde kredis en la malobstrukca imagopovo de la homaro. Li publikigis 42 librojn de sia poezio kaj senlace laboris por plibonigi la pozicion de la franca lingvo en Nov-Brunsviko. Li aktive nutris la kreeman impulson de aliaj kanadaj verkistoj, direktante la eldonon de pli ol 300 el iliaj libroj. Fred Cogswell dufoje ricevis la Bliss Carman–Premion en Poezio, kaj en 1981 li ricevis la Ordenon de Kanado. Li mortis en Vankuvero.

Frederick Cogswell (1960)

(kun permeso de la heredantino)

Lost Dimension

I from my myness
must a you create,
for your yourness
is inviolate.

Likewise, your yourness
makes the me that you have known,
for my myness
is all my own.


Hard spheres are we
whose edges join,
seeking to grasp
an illusion
of lost dimensions,
whose laws are such
that not circumference
but centres touch.

Perdita dimensio

Mi el mia mieco
devas iun vin krei,
ĉar vian viecon
oni ne rajtas tuŝi.

Same, via vieco
faras la min, kiun vi jam konas,
ĉar mia mieco
tute la mia estas.

Duraj sferoj estas ni,
kies randoj kunmetiĝas,
penante por intui
iluzion
de perditaj dimensioj
kies leĝoj tiel estas,
ke ne periferioj
sed centroj tuŝas.



Robert Priest (1951–)

La poeto, infanlibra aŭtoro, kantverkisto kaj kantisto Robert Priest naskiĝis en Anglio en 1951 sed delokis al Scarborough, Ontario, kiel kvarjara infano. Li forlasis la Universitaton de Waterloo, kie li studis matematikon kaj decidis anstataŭe skribi poezion. Li verkis dek librojn de poezio, du infanajn romanojn kaj multnombrajn kantojn kaj poemojn. Sub la kromnomo de "Dr. Poetry" (D-ro Poezio), Priest ankaŭ prezentis sin dum la parolita-vorto-programo de CBC-Radio, Wordbeat, kaj aliloke.

Robert Priest (2008)

(kun permeso de la poeto)

The Infinite is closing in on us La senfino proksimiĝas al ni

The infinite is closing in on us; it was once infinitely infinite, each possible piece of it capable of containing an infinite number of other infinitely infinite infinities, endlessly endless.	La senfino proksimiĝas al ni; iam ĝi senfine senfinis, ĉia ebla senfinero kapablinte enhavi senfinan nombron de aliaj senfine senfinaj senfinaĵoj, senĉese senĉesaj.
Anyone could take away an infinity from some infinity and still leave that infinity utterly infinite in all its original infinitude, nothing missing, and meanwhile the infinity that was taken is likewise infinitely infinite in every way.	Iu ajn povus forpreni senfinaĵon el iu senfinaĵo kaj ankoraŭ lasi tiun senfinaĵon absolute senfina en ĉiom el sia originala senfineco, nenio mankanta, kaj dume la senfinaĵo, kiun oni prenis, sammaniere estas ĉiel senfine senfina.



<p>So the local is not accurately locatable; people never really are anywhere. It is impossible to put a foot down on a place; every place is places with infinite other places in it, of it, from it. We can never step into the same river even once; there are a thousand rivers before the sole touches bottom. We meet a woman and think we've met one person, but there are infinite consciousnesses in those eyes; a trillion smiles ignite in that glimmer.</p> <p>If you slow us down like film, you'll see that there are spaces where we are still in time and spaces where we are gone; and in those gone spaces, infinite other gone spaces wait.</p>	<p>Do la ĉi-loko ne precize lokalizeblas; homoj neniam vere estas ie ajn. Ne eblas piede paŝi sur lokon; ĉiu loko estas lokaro kun senfinaj aliaj lokoj en ĝi, de ĝi, el ĝi. Ni neniam povas eniri la saman riveron, eĉ unufoje; estas mil riveroj antaŭ la plando tuŝas fundon. Ni renkontas virinon, kaj opinias, ke ni renkontis unu personon, sed estas senfinaj konscioj en tiuj okuloj; duiliono da ridetoj ekflamas en tiu lumeto.</p> <p>Se vi malrapidigas nin kiel filmon, vi vidos, ke estas spacoj, kie ni daŭras dum ioma tempo, kaj spacoj, kie ni forestas; kaj en tiuj forestaj spacoj, senfinaj aliaj forestaj spacoj atendas.</p>
--	---



You can take time away from eternity forever,
and there is still time streaming endlessly.

There are eternities between
the kiss and the mouth,
tongue and pomegranate.

Just as seeds will become seeds
in exponential, ever-expanding pulses,
we come from us,
and when we come,
we become and cease and become again,
strobe-like, dying and bursting,
delimiting the dark about us
with the charge of presence after presence,
extremely local but unlocatable,
hazy not just in the bed of the one
but in all the possible beds
that the bed of one can become.

Vi povas forpreni tempon el eternaĵo por ĉiam,
kaj tempo daŭras, fluante senĉese.

Estas eternaĵoj inter
la kiso kaj la buŝo,
lango kaj granato.

Kiel semoj semiĝos
per eksponencialaj, ĉiam-ekspansiantaj, legumenaj pulsoj,
tiel ni venas el ni,
kaj kiam ni venas,
ni estiĝas kaj ĉesas kaj denove estiĝas,
stroboskopece, mortante kaj dehiskante,
dislimante la malhelon ĉirkaŭ ni
per la ŝargo de ĉeestanto post ĉeestanto,
tre loka sed nelokalizebla,
svaga ne nur en la lito de la unu
sed en ĉiuj el la eblaj litoj,
kiujn la lito de unu povas estiĝi.



Émile Nelligan (1879-1941)

Émile Nelligan, franclingva poeto, naskiĝis en Montrealo en 1879. Li unue eldonis iun de sia poezio kiam li aĝis nur dek ses. Kiam li estis dudek-jarulo, li suferis psikozan kolapson, de kio li neniam resaniĝis. Oni unue eldonis 107 erojn en liaj kolektitaj verkoj en 1903, kaj li tuj gajnis grandan renomon. Poste oni malkovris plu da lia poemaro, kaj la kompleta verkaro de Nelligan nun inkluzivas 171 titolojn. Li mortis en 1941.

Émile Nelligan (1903)

(publika havaĵo)

Soir d'hiver Vespero de vintro

Ah! comme la neige a neigé!
Ma vitre est un jardin de givre.
Ah! comme la neige a neigé!
Qu'est-ce-que le spasme de vivre
à la douleur que j'ai, que j'ai!

Tous les étangs gisent gelés,
mon âme est noire: Où vis-je? Où vais-je?
Tous ses espoirs gisent gelés:
Je suis le nouvelle Norvège
D'où les blonds ciels s'en sont allés.

Ha! kiel falis la neĝo:
prujn-ĝardenoj sur fenestroj —
ha! kiel falis la neĝo!
Kiel komparas vivspasmoj
al mia nuna doloro?

Ĉiuj lagoj glaciigis:
kie loĝi? kien iri?
La esperoj glaciigis:
nigras la nova Norvegi'
de kie ĉieloj blondis.

Pleurez, oiseaux de février,
au sinistre frisson des choses,
Pleurez, oiseaux de février,
pleurez mes pleurs, pleurez mes roses,
aux branches du genévrier.

Ah! comme la neige a neigé!
Ma vitre est un jardin de givre.
Ah! comme la neige a neigé!
Qu'est-ce-que le spasme de vivre
à tout l'ennui que j'ai, que j'ai!

Ploru, birdoj februaraj
pro sinistraj frostotremoj.
Ploru, birdoj februaraj;
ploru larmoj, ploru rozoj
al la branĉoj juniperaj.

Ha! kiel falis la neĝo:
prujn-ĝardenoj sur fenestroj —
ha! kiel falis la neĝo!
Kiel komparas vivspasmoj
al mia tuta enuo?

RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

Literatura novaĵo: Bridge of Words de Esther Schor

Esther Schor estas aŭtoro de Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language (Ponto el vortoj: Esperanto kaj la revo de Universala Lingvo. Metropolitan Books, 2016).

Kiel profesoro de la angla ĉe Universitato Princeton, ŝi studas la originojn kaj evoluon de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝian pozicion en la moderna mondo. Multilate, ŝia nova libro estas rekonfirmo de la graveco de Esperanto kiel socia movado en la hodiaŭa mondo. Laŭ recenzo en New York Times, la libro «lasas nin sen dubo ke, kion ajn Esperanto faras, ĝi ŝajne ĝuste faras ĝin.»

Oni povas trovi la libron Bridge of Words ĉe [Amazon](#).

Eltirita el Informilo (Numero 25, novembro 2016) de la UN-oficejo de la Universala Esperanto-Asocio
www.esperantoporun.org

Anonco : Internacia kalendaro pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!

László Szilvási kreis aktualan liston pri ĉiuj konataj Esperanto-renkontiĝoj kaj kongresoj kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallongaj priskriboj, retejaj adresoj, ktp.

Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage.

Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperanto-amikoj!

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!

Adreso de la Kalendaro:
eventoj.hu/kalendaro.htm

Anonco: Elŝutu PReVo!

PReVo, portebla versio de Reta Vortaro, estas havebla por androidaj tabulkomputiloj kaj poŝtelefonoj el Google Play aŭ ĉe busydoingnothing.co.uk/prevo/ ! La aktuala versio estas 0.14.

Ĝi estas uzebla sen retkonekto kaj ĝi estas rapide serĉebla per la klavaro.

PReVo estas libera kaj senpaga programo.

La androidan version prizorgas Neil Roberts, kontaktebla per «bpeeluk@yahoo.co.uk» .

ĈEFAJ LINGVOJ	ŜABLONO	Serĉu
esperanto	1. TEK Modelo duonreliefa aŭ desegnita sur plataĵo (ligna, metala, kartona, teksaja, papera), laŭ kiu oni formtrancas objektetojn.	sxa
angla	2. FIG Banalajo, senoriginalaĵo, kvazaŭ farita laŭ preta modelo: <i>li forjetis la romantikajn ŝablonojn; laŭŝablone edukitaj homoj; esperantismo ne celas ŝablonigon (samtipigon) de la homaro; lerta poeto evitas trouzitajn ŝablonigintajn vortojn</i> → gurdita , triviala	ŝablona
franca		ŝablondesegni
ĈIUJ LINGVOJ	ŜABLONA	ŝablono
afrikansa	1. El ŝablono, farita per ŝablono: <i>krei novan projekton el ŝablona interna modelo</i> .	ŝafhundo
angla	2. FIG Farita laŭ kutima maniero kaj sekve banala , kliŝa , stereotipa : <i>la rakonto estas tro ŝablona, nekomplika kaj deklara</i> .	ŝafo
araba	MALŜABLONA	ŝafo
belorusa	FIG Ne farita laŭ ŝablono, ne laŭ kutima maniero, freŝe originala : <i>ĉiuj ŝiaj ceteraj verkoj estas karakterize malŝablonaj</i> .	ŝafto
bretona	ANGLA	ŝagrino
	~o 1: template, model, pattern	ŝafo

Anonco : inter Ipernity-malapero kaj Facebook, ekzistas alternativo!


Bona novaĵo por esperantistoj kiuj malĝojis pro la anonco de Ipernity-malapero kaj tiuj kiuj malŝatas Facebook : la socia reto V Kontakte (VK) estas disponebla en Esperanto! Rusa volontulo el E@I, Ilja Gnusarev, tradukas ĝin ĝisfine.

VK estas la 4-a plej vizitata retejo en la mondo kaj havas 90 milionojn da uzantojn ĉiumonate. Tiu rusa socia reto estas senpaga kaj ĝi permesas konservi kaj facile trovi multajn aferojn: videojn, sonregistraĵon, dosierojn, bildojn kaj fotojn diversformate. Kaj plej grave, ĝi permesas interŝanĝi esperante!

Iru al al vk.com por registriĝi!

Vidu informleteron de Vinilkosmo n-ro 41

Musiko estas grava parto de esperanta kulturo. Pro tio, vidu [informleteron de Vinilkosmo](#) kaj subtenu esperantajn artistojn! Multe da novaĵoj aperas, inter alie de la plej ŝatataj esperantistaj musikistoj : **BaRok-Projekto**, **jOmO**, **Kajto**, **Martin & la talpoj** kaj **Ĵak le Puil**.



Peto de Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Se vi intersiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al:

**Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio.**

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viaj preferojn por faciligi nian laboron.

Ni atendas vian afablecon plenumi nian peton.
Kun anticipa danko ni kore salutas vin.




Respondeculo de Koresponda servo de JEI,
Nobuo Sakurai

KRUCVORTENIGMO DE TREVOR BROWN

LEGOMOJ

Printu tiun paĝon por provi krucvortenigmon!



Transen:

- 4. Cepo/ajlo granda kiel antaŭbrako
- 6. Purpura
- 7. Enhavas verdaj folioj
- 10. Grizaj fungoj

- 15. Malgrandaj verdaj globoj
- 16. Pikanta
- 17. "Fingroj de sinjorino"
- 18. Spiko
- 19. Humuso

Malsupren:

- 1. Cirkloj en legoma supo
- 2. Larmanto pro tiuj
- 3. Pica saŭco pro tiuj
- 5. Ruĝa, malgranda, kaj krakmaĉa
- 8. Kuniklo ĝuas ĝin

- 9. Popeye
- 11. Vaksa, granda kiel kapo
- 12. Tofuo farita de tiuj
- 13. Longaj
- 14. Rusa supo

Vidu solvon en venonta numero de Lumo!

Printu tiun paĝon por provi Vortan serĉon!

Saluton,
mia nomo estas
Francina Fiŝo.

Esperantaj enigmoj plaĉas al mi.
Ĉu enigmoj plaĉas al vi ankaŭ?

Mi kaŝis vortojn en la kvadrata
sube. Se vi povas, trovu la vortojn!

Amike,
Francina la Flava Fiŝo



Z	L	Ĉ	B	T	D	T	Ĉ	H	A	C	B
I	R	L	A	S	F	D	O	R	O	A	T
R	U	T	N	V	I	Ĝ	O	G	K	R	T
A	O	Z	Z	D	A	L	J	D	D	Ĝ	A
P	R	O	Z	K	O	L	O	R	A	E	D
D	U	G	B	K	T	B	F	Z	G	N	R
U	Ĝ	R	L	R	L	J	I	N	C	T	E
G	A	O	P	A	U	R	O	R	O	A	V
F	I	O	N	U	G	N	N	I	G	R	A
V	P	K	B	I	R	A	A	C	I	F	G
Ŭ	A	S	A	Ĝ	N	A	R	O	H	Ŭ	U
Ĵ	F	Ĉ	E	D	O	Ĉ	E	I	P	Z	C

ARGENTA
BLANKA
BLUA
BRUNA
FLAVA

GRIZA
NIGRA
ORANĜA
ORO
PURPURA

ROZKOLORA
RUĜA
VERDA
VIOLKOLORA

Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu kontribuaĵojn,
kaj atendu la printempan numeron de Lumo!

Redaktorino: Kamila Koziej Lévesque

Enketisto: Geoffrey Greatex

Provlegantoj: Bob Williamson, Geoffrey Greatex, Francisko Lorrain

Kompostado: Kamila Koziej Lévesque

Kontribuantoj: Kamila Koziej Lévesque, Nicolas Viau, Paul Hopkins, Bruce Crisp, Kiara Waters, Martin Lavallée, Lottie Ericson, Geoffrey Greatex, Eriko Pedersen, Trevor Brown, Jason Donev